



LA SUDA KRUCO

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio. Fondita en Julio 1920.

(Nova Serio)

Redakcio-Administracio:

BOX 731F, ELIZABETH-STR.: P.O., MELBOURNE (AŬSTRALIO).

Abono (por 12 numeroj):

Aŭstralia: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj — Ekster Aŭstralia: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: REGINALD BANHAM, F.B.E.A.

Specimena numero — unu respondkuponon aŭ 30 c. U.E.A. kupono.

Unu numero: 4 pencoj. :: :: :: :: Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 146 (13th Year)

MELBOURNE (AŬSTRALIO).

6 NOVEMBRO, 1932.

This Number Contains the New Zealand Chronicle

EDITORIAL.

Why did we double the size of "La Suda Kruco?" Because we believed that the additional support we would receive would easily pay the extra expense. Have we been disappointed? No, on the contrary we are delighted with the response. If the interest shown in the first number is maintained we shall soon have our paper firmly established and, we hope, again increasing in size. We have big plans for the future and we need your help. May we make some suggestions?

Groups:—Take a regular number each month for sale or distribution. The Coburg Group, Melbourne has decided to issue "La Suda Kruco" to its members and has given us a regular order for twenty-six copies. Can we expect that every group in Australia and New Zealand will give us a similar order within the next month?

Individual Esperantists:—Pay for a copy to be sent

- (1) To your foreign correspondent; you know how hard it is to get suitable matter to send overseas;
- (2) To someone whom you know to be interested but still needs a little persuasion;
- (3) To an Esperantist who, through unemployment, is unable to subscribe (we can supply you with names if you wish);
- (4) To some Institution where the paper will be brought before the Public.

TO OUR CLUB-ITEMISTS.

Kindly write us as briefly as possible when dealing with things of very limited interest. Remember, it costs

us about 2d. a line to bring out this paper!

DEFENDO DE MODERNAJ POPULARAJ KANTOJ.

Ni ĉiuj kutimiĝas nuntempe aŭdi multon pri la superco de la kantoj de la pasinteco, kaj la bedaŭra degenereco de la estantaj. Estas nun la modo kulpigi ĉion apartenantan al ĉi tiu epoko: ĉio siavice estas diskutita kaj senhaŭtigita: niaj vestoj, moraloj, vizaĝkoloro, stato de niaj animoj, kaj ebla destino post morto. Certe estas, ke niaj kantoj ne povas esperi liberiĝi. En la mezo de ĉi tiu elversajo de kondamneco, la skribanto kuraĝas levi la voĉon por la nuntempaj kantoj. Ŝi tute ne pretendas, ke ili estas bonaj. Tio estus tro multe. Sed certe ŝi humile sugestias, ke ili estas malpli malbonaj ol tiuj de la estinto.

Fama vidonisto kiu nun vizitis Melburnon diris, ke pli ruinigas ol la "jazo," estas la sentimentaj kanzonoj, kiujn ni tiel libere ricevus tra la aero. Sendube li pravigas. Sed la sentimentala kanzono ne estas specialeco de ĉi tiu tempo: ĝi estas heredaĵo de kio la homraso ne povas liberiĝi: heredaĵo de kio la plejparta homraso ne volas liberiĝi: io, kion oni povas kanti senvoĉe, senpenso, senmuzikeme: oni nur bezonas malfelmi la buŝon, kaj la vokalaj kordoj faras la restaĵon. Sed vere estas, ke ĉi tiu arto floris multe pli forte en la pasinteco ol nun. La skribanto de ĉi tiu artikolo antaŭe englutis ĉion, kion oni diris pri la mal-supereco de niaj kantoj, sed ŝi antaŭ ne longe trovis antikvan gazeton de 1868, kiu enhavas multajn reklamojn por la tiamaj novaj muziko kaj kantoj.

Ĉi tiu gazeto estas bonekonata kaj bonstila, kaj certe nur troviĝis en la alt-kaj mez-klasaj domoj de Anglujo kaj Aŭstralia. Sed la kantoj! Ili estas preskaŭ ĉiuj por la fraŭlinoj ĉar, je tiu dato, la kantarto estis unu el la malmultaj, kiujn povas praktiki virino, kiu volas reteni sian virinecon (kio ajn tio estas: mi konfesas, ke mi ne scias). Preskaŭ ĉiuj el ili (la kantoj, ne la virinoj) traktas pri morto, rompitaj koroj, forlasitaj virgulinaj, kaj tomboj al kiuj revenas la amanto tro malfrue por fari ion krom plori sur ĝi. Larmoj, sopiroj, preĝoj, ĝemoj, sed neniam eĉ unu ridu. La titoloj de kelkaj el ili faras interesan legadon. "La larmo de soldato" estas unu—sendube tre kortuŝa; sed kio pri liaj blasfemadoj? "Ĉesu, vundita koro"—sed oni bedaŭras, ke la vundita koro batas dum kvar strofoj. "Oh, lasu min morti" diris alia, kaj oni volas respondi, "Jes, lasu ŝin." "Oh sparu mian floron, li nur lasis tion al mi," plendis alia fraŭlino. Ŝajnas, ke en tiuj tempoj, nur la virinoj estis fidelaj: sendube ne estis moda por la sinjoroj. Alia titolo, kiu iom ĉarmas min estas "Ekstere ŝi ne estas bela." Ĉi tiu lasta estas kanto de fraŭlo, kiu fanfaronas, ke li tute ne zorgas pri la beleco: aŭ eble li faras virtion el neceso.

"La mortsonorilo" larmigas ĉiun okulon. La reklamo diras, ke ĉi tiu estas tre sukcesa: oni bone povas imagi. El ĉi tiu miksiĝo de fraŭlinaj krioj, nur unu sinjoro plende demandas "Ĉu mi devas foriri al alia lando?", oni rapide respondas—pro ĉielo jes. Mi donis nur malmultajn titolojn el granda kolekto de malfeliĉo, kiu superfluis la mondon en 1868. Ĉu oni

povas diri, ke ili estas pli bone ol niaj nuntempaj juveloj, eĉ tiel kiel "Mia infaneto" diris jes" aŭ "Mi havas daton kun pantolono?"

—E.G.

*(La usonanoj ofte nomas siajn amatojn "baby").

INDIGENA LEGENDO.

Antaŭ multaj jaroj kelkaj antropologoj decidis, ke la aŭstralia indigeno estas la plej malaltrango el la homa speco. La ordinara blankulo, okupita pri siaj propraj aferoj kaj tute ne interesiita pri la nigro, sen diskuto kredis la diron—kaj tio estis tio. Pli malfrua sciencistoj, tamen, ne konsentis al tia arbitra decido. Vera studo de indigenaj moroj kaj kutimoj iniciatis, kiu rezultigis pli simpatian vidpunkton. Kelkaj tre legindaj verkoj aperis. Unu el tiuj-ĉi pritraktas mitojn kaj legendojn. La verko malkaŝas strangan fakton: la indigeno posedas tre plenan parolan literaturon. De la indigenoj mem la verkisto kolektis kaj tradukis la mitojn kaj legendojn, kaj la rezulto estas aro el rakontoj kun la naiva ĉarmo de ĉiuj aferoj sinceraj. Tiuj-ĉi verko estas la fonto el kiu ĉerpis la sekvantan rakonton. Ĝi ne estas vera traduko; ni rakontas pli-malpli per niaj propraj vortoj.

Sur la istmo Pullamewal, kiu sin trovas inter la lagoj Alexandria kaj Albert, nemulte malproksime de la marenfluejo de la rivero Murray, loĝis du fratinoj. Ili estis bone instruitaj pri triboj moroj kaj ĉiuj detaloj de la artoj necesaj por subteni la vivon. Kutime la gejunuloj nomigis laŭ la karaktero trajto aŭ speciala propraĵo. Al tiuj-ĉi knabinoj, tamen, oni ne donis apartajn nomojn. Tio ili amis unu la alian kaj, kvankam estis malgranda diferenco laŭ aĝo, tiom ili similis unu al la alia, ke la triboj maljunuloj nomis ilin kune Mar-Rallang (t.e. du en unu).

Proksimume tiam, kiam naskiĝis la knabinoj, vidvino malĝojis pro la morto de sia edzo. Dike ŝi estis ŝmirinta sian kapon per blanka argilo, kaj grandaj estis la vundoj, kiujn ŝi estis tranĉinta en sia korpo por esprimi sian egan malfeliĝon. Pro sia afliktigo ŝi kredis al la Granda Spirito Nurunderi: "Kial vi forprenis mian edzon? Kial mi ne havas filon?"

Nurunderi aŭdis la plendon kaj metis junan virinfanon inter la apudaj arbustaroj. La vidvino aŭdis lin plori. Gojege ŝi adoptis lin kvazaŭ sian propran filon. Ŝi nomis lin Wajungare, kiu signifas "li, kiu revenas al la

steloj." Kun la helpo de frato ŝi edukis lin.

La ĉaso estas ĉefe la indigena vivrimedo, tial li devis lerni ĵeti bumerangon kaj ĉaslancon. Li devis lerni la kutimojn de birdoj kaj bestoj; ankaŭ lerni imiti iliajn kriojn. Li devis studi piedajn postsignojn ĉaspecajn kaj reprodukti ilin en la polvo aŭ sablo. Li devis bone elerni la tribojn morojn. Per ludoj, kantoj kaj dancoj, per legendoj rakontitaj de la gemaljunuloj ĉirkaŭ la vespera fajro li lernis tiuj-ĉi aferojn kaj kreskis en bonaspektan, fortikan junulon.

Estante donaco de la Granda Spirito li estis kvazaŭ homo aparta. Oni donis al li terpecon kaj malpermesis, ke iu transiru ĝiajn limojn. La anstataŭonklo sendis kurieron al la diversaj familioj de la tribo, ordonante, ke neniu knabino edziniĝu kun li.

Nu, la printempo estas eduka periodo de la junulo. Tiam li devas observi la amkutimojn de la bestoj kaj aŭskulti al la ankriroj de la birdoj. Iun printempon Wajungare loĝis sole sur sia terpeco. La pli maljuna fratino sin kaŝis inter la arbustoj apud lia ŝirmilo kaj imitis la krimon de dromaĵo. Preninte ĉaslancon Wajungare subite ekiris por ĉasi la birdon. La knabino sin malkaŝis kaj petis, ke li helpu ŝin trovi perditan fratino. Estis nur ruzaĵo por konatiĝi kun li. Pli malfrue la juna fratino ruzis same. Rezulte ambaŭ fratinoj edziniĝis kun Wajungare.

Kiam la onklo lernis pri ĝi, ege li koleriĝis. Tuj li rapidiris al Nepelle, la grandulo en la ĉielo, por peti konsilon.

"Apartigu ilin," lakone konsilis Nepelle.

Do, iun nokton, per peco da arĝelo la onklo ĉirkaŭvolvis kelkajn ruĝvarmajn cindrojn kaj, esperante, ke la fajro apartigus ilin, li ĵetis la pakadon inter la arbustojn proksime al la lago de la gejunuloj. Post nelonge la vespera venteto ventumis la subbrulantaĵon en flamon kiu ekbruligis la arbustojn ĉirkaŭ la lago.

Baldaŭ la fajro vekis la dormantojn. Preninte siajn du edzinojn Wajungare rapidiris al la lago. La trio sin ĵetis en la akvon. Fojon post fojo ili devis subigi sin sub la akvo, ĉar la fajro, blovita de plifortiĝanta vento, ĉirkaŭis la lagon. Ardaĵoj falis simile al brula pluvo. Ekflamis la junkoj, eĉ la lagobordo kaj densa nubo el fumo kovris la akvon. La malfeliĉuloj preskaŭ sufokiĝis.

Wajungare malsperis. Liginte ŝnu-

ron el junkoj al la fino de sia ĉaslanco, li kriis al Nepelle, la dio de la steloj. "Ĥio, patro de la homaro, aŭdu mian peton, ne pro mi, sed pro miaj edzinoj. Tenu tiun-ĉi ĉaslancon ĝis ili suprengrimis en sendangerecon. Tiam, kiel plaŝos al vi, agu miaflanken laŭ via volo." Kaj li ĵetis la ĉaslancon fortege en la ĉielon.

Nepelle aŭdis la krimon. Li tenis la ĉaslancon ĝis la du edzinoj suprengrimis en la ĉielon. Poste li vokis al Wajungare: "Venu, mia filo. Prenu cian lokon en la ĉie'oj kaj elmontru cian mision. Brilu kaj elmontru al la terminfano, ke ci taksis la sendangerecon de ciaj edzinoj pli alte ol la cian vivon."

Nuntempe la indigenoj ankoraŭ montras sur tri steloj en la orienta ĉielo kiuj, ili asertas, reprezentas Wajungare kaj liajn du edzinojn.

—H. BAGS.

YOU WANT TO KNOW
how to obtain
SIX ESPERANTO BOOKS
(2000 pages)

at **ONE QUARTER** of the
usual cost?

Then write at once to

Rep. in Australia
for "Literatura Mondo":—
L. THOMSON, "Tallengatta,"
Church-street, Pymble, N.S.W.

KVAKERISMO KAJ PACO

Mi havas senpagajn ekzemplerojn de literaturo (Esperanta kaj angla) pri Kvakerismo kaj paco por disdoni. Bonvole petu per ilustrita poŝtkarto aŭ letero al:—D-ro Fred J. Williams, Samarai, PAPUA. (Iratorganoj bv. represu.)

OBITUARY.

With regret we learn of the death on 6th August of Miss H. Batchelor, a member of the old Hobart Club. She held the cause genuinely at heart, although in recent years, through failing health, she was not able to take active part in the furthering of it. We express our condolence to all concerned.

SERVICE COLUMN.

Many of our readers subscribe to no other Esperanto gazette and therefore have difficulty in finding answers to the many little problems that confront them relative to the language. On receipt of stamped addressed envelope we undertake to supply addresses of foreign correspondents or others, to respond to the best of our resources on any point whatsoever concerning Esperanto language, literature, history, organisation, etc.

IMPORTANT.

From henceforth kindly address to Mr. R. Rawson, Bookshop, Exhibition-str., Melbourne, all correspondence relative to the administrative side of our organ.

All postal notes, money orders, etc., new subscribers' addresses, change of present addresses, complaints as to non-receipt of paper and suchlike should be made out or forwarded direct to him.

Communications such as literary contributions, club notes, letters to the "service column," in short, anything touching the editorial side should be addressed, as now, to Box 731F., P.O., Elizabeth-st., Melb.

TO OUR SUPPORTERS

Thanks for the following:—Miss E. Boden, 5/-, Dec., '33; Mr. W. King, 25/6; Dr. F. Williams (sales), 3/6; Miss D. Bell, 5/-, July, '33; Mr. C. Smith, 4/6, Oct., '33; exchange, 3/9; R. Banham (sales), 5/-; Miss Trundle, 10/- (sub. and gift), Nov., '33; Mr. A. G. Mackie, 4/6, Sept., '33; Mr. A. Atkinson, 4/6, Sept., '33; Mr. W. Gray, 4/6, Sept., '33; Miss Nalder (Bendigo Esperanto Group), 13/6, Sept., '33; Mr. H. M. Lanyon, 9/-, Sept., '33; Mrs. J. N. Johansen, 4/6, Sept., '33; Mr. L. Thornton, 4/6, Sept., '33; Lt. Col. Fulton, 4/6, Sept., '33; Miss E. Leftley, 4/6, Sept., '33; Mr. E. G. Logan, 4/6, Sept., '33; Mr. W. Flanagan, 4/6, Sept., '33; Mr. A. Parker, 4/6, Sept., '33; Mrs. Mathie, 4/6, Sept., '33; Richmond Parol-Rondo, 4/6, Sept., '33; Coburg Group (sales), 6/8; Melbourne Esperanto Club (subs.) £3/10/9; Sales, 16/6; Mr. Hills, 10/- (sub. and gift), Dec., '33.

KRONIKO.

Sidnejo.—Okan de oktobro gesam-oj kaj amikoj piknikis al la famkonata Vauluse House, hejmo de la iama ankaŭ fama ŝtatisto Wentworth. S-ro Rutland, nelacigebla organizinto de la festo, klarigis, ke la ŝtatisto estis aristokrato, kiu volis dispartigi Aŭstralion en graflandon kaj starigi lokajn baronojn k.t.p. En la parlamentaj debatoj de la tiama iu ŝercema politikisto vortbilde kreis "baronon de Woolloomooloo" kaj aliajn fantaziojn, kio tiel ridindigis la aferon, ke Wentworth fine rezignis ĝin.

"Trezoŝercero" okazis en posttagmezo kaj rezultis, ke sam-ino Bertson, el Nov-Zelando, gajnis la premion, ujon de konservitaj ananasoj. La Esp-a rondo ŝajne estis la plej vigla en la parko, kaj dum la ludado de amerika baz-balo kelka homamaso arigis por ŝercmekoti. Inter ili ni diskonis kelkajn flugfoliojn pri Esp-o.

Hurstville Wants Esperanto.

On Sunday evening, 16th inst., s-ro Rutland and Thomson addressed a

meeting by invitation at Hurstville, near Sydney, and those present decided to commence a study Circle which will be held every Thursday night at Hurstville. Hurstville-ites not in touch with the local group should get in touch with the Sydney Esperanto Society (address given elsewhere in this number) for information.

Lecture Campaign.

Societies and Groups desiring lectures and informal talks on Esperanto should communicate with the Secretary of the nearest local group, at address given in this paper. Provided a guarantee is given for out-of-pocket expenses the Sydney Society will arrange for a lecturer or lecturers to visit N.S.W. country centres by arrangement.

W.E.A. Helps Esperantist Funds.

A interesting Dramatic and Musical performance was given in Sydney at the W.E.A. Rooms on Thursday, 13th Oct., by members of the Workers' Educational Association to assist the funds of the Sydney Society, which materially benefitted.

Adelaide.—Plezure ni anoncas, ke nia grupo jam staras fortike. Ni povas kredi, ke jam estas metita la bazŝtono de sukcesa Esp-a klubo en Adelaide. Ni nun direktas la fortojn pliperfektigi kelke da niaj membroj, kiuj baldaŭ kapablos instrui novajn klasojn. Post ĉi tiu preparlaboro, ni komencos intensan varbadon.

Ni havas belan klubojn kun perfekta dancplanko. Ĝi lokas je la kvina etaĝo de Paringa-konstruo en strato Hindley. Ĉiun dnan dimanĉon ni havas Esp-an kampfeston.

Plaĉas al ni informi la Melb. E. Klubon, ke ni parolas Esp-on dum niaj kampar-iroj (Sufiĉas! Ni ne plu diru pri tio).

Bedaŭrinde nia prezidanto, s-ro Waterman, suferas malsane, sed la klubon kondukas la sek-o, L. C. Thornton, kaj la vic-prez-o, Leŭt. Kol. D. Fulton. Melburna Klubo! Vi havas gravan konkuranton. Gardu vin!

Perth, W.A.—Nova grupo, gvidata de s-ro D. Miller, starigis en Perth. Ĉiu el la geanoj estas ano de la Baha'a movado. Tiu religia movado, en ĉiuj mondpartoj, uzas esperanton. Jam la grupo bone progresas. Plezure ni ricevis la unuan karon de "La Suda Kruc" (nova serio). Ĉiu opinias, ke la formato kaj enhavo estas bonegaj.

COBURG CLUB'S THIRD BIRTHDAY.

Coburg Esperanto Club celebrated its third anniversary by holding a social evening in the Labour hall, Sheffield street, on 15th Sept., over 150 guests being present. Other groups represented were Melbourne club, Melbourne Society, Brunswick, Box Hill, Northcote, Richmond, Port Melbourne and Friends of the Soviet Union (Melbourne).

The hall was decorated in the Esperanto colours—green and white—with streamers and groups of five lanterns representing the five-pointed green star, the international badge worn by Esperantists.

The president (Mrs. A. C. Hintze) said that the social was to afford an opportunity to Melbourne Esperantists to meet each other and so enlarge their practical knowledge of the language.

Credit for the success of the evening is due to Messrs. Spencer and Williams (secretary and assistant), and Mr. Glaisher (Melbourne club), who have also done much for the local club. The president of the Melbourne club (Mr. Drummond) who is one of the pioneers of the movement in Melbourne, gave a short address in Esperanto, congratulating the Coburg club on its progress. Mr. Stanmore (Brunswick), supported Mr. Drummond. Amongst those present was Mr. R. Rawson, who gives forthrightly Esperanto lessons through 3LO.

A programme of songs and recitations in Esperanto and a Russian folk dance in peasant costumes followed. After supper had been served, those present danced until midnight.

("Brunswick and Coburg Gazette," 23rd Sept., 1932.)

MALMULTE KONATAJ VORTOJ DE ZAMENHOF (N-ro 4)

Ekzistas homoj, al kiuj la aĝo blankigas la harojn, sed tamen ne tuŝas la koron, kiu restas ĉiam en plena freŝeco kaj juneco kaj ĉiam kun egala forto batas por ĉio bela kaj bona. Ĉiufoje kiam mi vidas tian homon, mi diras al mi: "Ĝen estas bela minuto en mia vivo!"

10 Aŭgusto 1905 (unua kongreso esperantista en Boulogne-sur-Mer).

—L. ZAMENHOF.

[Vortoj el albumo de s-ro Felix Moscheles, London.]

N.Z.E.A. Section. 10th Official Bulletin.

Reviewing the present financial year, which, in accordance with a decision made at the 3rd Esperanto Congress (Christchurch, 1931), comprises only eight months and therefore concludes on the 30th November, 1932, the Executive of the New Zealand Esperanto Association is pleased to record that another year—a troublous one economically for many—has been safely negotiated and that another page of achievement has been added to the Association's history. Apart from the work actually performed by the NZEA office-bearers, the Association's weathering of the storm is undoubtedly due to the loyalty and generosity evinced by the large section of the membership which, during the time of trial, did not desert the NZEA; the Executive accordingly desires all concerned to know that their financial support and encouraging gestures are very much appreciated.

Membership.

It is true that during the year membership decreased from 113 for the previous year to a moderate 90, including 12 new members, all of whom have been enrolled as "Standfast" members to denote their support during a difficult period. This receding was not unexpected; most similar organisations which are surviving the present crisis consider their year successful if 50 per cent. of the respective memberships are retained. The NZEA has, therefore, in this respect fared much better; and, moreover, the fall in membership experienced is substantially offset by an increase of over 100 per cent. in the amount of donations received during the year; £14/17/5 as against £2/5/1 for the 1931-32 period; and this in the face of a world economic crisis! A clearer expression of unshaken faith in Esperanto would, comparatively speaking, be difficult to obtain.

Additional Donations.

Since the acknowledgments in the 9th "Official Bulletin" ("La Suda Krucio," July issue), additional donations of £1/2/5 to the NZEA general funds have come to hand; for this assistance the Executive cordially thanks the following:—Miss V. M. Weaver, 10/-; Mr. A. C. Ward, 7/6; Mrs. L. Lusher, 2/11; Mrs. B. Dorolfaff, 1/6; and Anonymous, 6d.

Propaganda, etc.

Notwithstanding its slightly decreased income, the NZEA has during the past four months, indeed during the whole year, tried to maintain its high standard of propaganda work throughout the Dominion. No opportunity has been lost to place Esperanto before the public. The Wellington Esperanto Club by means of its well-written club reports, published weekly in each of the two daily newspapers of the capital city, has materially assisted; other clubs in the Dominion might well follow this line of action.

Since the last "Official Bulletin," in which an outline was given of a new practice whereby propaganda literature relating to Esperanto is forwarded to overseas visitors to the Dominion, the NZEA has supplied such literature to 52 further visitors, including the world-famous singer Madame Galli-Curci (who is credited with speaking six languages), M. Benno Moiseiwitsch, the noted pianist, and Count de Baillet-Latour, Chairman of the Olympic Games Association. It is interesting to note that the visitors hailed from Russia, U.S.A., Australia, England, Scotland, Hong Kong, India, Italy, Czechoslovakia, Belgium, Papete, and South Africa, making a total of 17 lands since the practice was commenced.

Newspaper work comprised the writing of a letter to the correspondence columns of "The Dominion," Wellington, and the translating for "The Evening Post," Wellington, of a lengthy article relating to unemployment which appeared in the official bulletin issued in Esperanto by the International Labour Office. The editor of "The Post" prominently placed the translation, and published a most favorable preamble which, in disclosing the source and channels of acquisition of the information given, strikingly referred to this practical side of Esperanto.

4th N.Z. Congress.

Arrangements are being made for this congress to open at Masterton on the 27th December next. At time of writing the Masterton Club has submitted to the NZEA for consideration two alternative programmes—covering a congress of two or of three days' duration. Whichever programme is

adopted, it may be said with certainty that all who make the trip to congress are assured of a warm welcome and a pleasant holiday, for Masterton is a delightful town with a strong, enthusiastic Esperanto Club. The time of the year fixed for the congress is ideal, and this should prove a factor in the assembling of a large number of Dominion Esperantists bent on making their gathering this year the success its three forerunners have been, and at the same time helping to further the movement in New Zealand. Mr. H. Franks (38 Workshop-rd., Masterton) is secretary of the Local Congress Committee. A special invitation to take part is being issued separately to New Zealand esperantists.

Correspondence Course.

The Executive of the NZEA hopes to announce early in the new year details of a correspondence course in Esperanto, concerning which the NZEA Tuition Committee has been collaborating with excellent results during the past 15 months. As directed by the 2nd N.Z. Congress at Auckland, the Tuition Committee investigated the desirability of introducing such a course, and having given an affirmative decision, the Committee accordingly prepared the necessary draft. On the 9th September the Standing Committee of the NZEA Executive, after considering the proposals, decided to obtain the Executive's approval to place the whole scheme, together with estimates of cost, before the 4th Congress in order to receive authority to launch the scheme as early as possible in 1933. With this authority forthcoming, a definite policy will be pursued, the realisation of which will, of course, require certain funds to meet the initial expenses incurred, but in this connection the strength of the NZEA will be demonstrated, as the necessary finance will be drawn from the NZEA reserves. From the number of enquiries for tuition which have been addressed to the NZEA since its founding almost four years ago, it is anticipated that the course of lessons will become a popular and an effective means of disseminating Esperanto in the Dominion.

Subscriptions.

The 5th year of the NZEA's activities begins on the 1st December, 1932, on which date NZEA subscrip-

tions (2/6 per annum) are again payable. The new year is expected to be but one of the many yet to contain an unlimited quantity of spade work for the respective NZEA office-bearers; in order to derive a maximum of results from its labors, the Executive requires full support from the membership which in the past has stood solidly behind the Association. It is hoped, therefore, that a large number of the 260 Dominion esperantists whose names are on the NZEA register will find themselves in a position to respond to another appeal for their monetary support in the noble work of spreading the language of Zamenhof. UNITY IS STRENGTH. New members to the NZEA are cordially welcome. Penny postage-stamps or postal-notes may be used in payment of subscriptions, and all correspondence should be addressed to Mr. W. H. King, Hon. Sec., Secretary's Office, G.P.O., Wellington, C.I.

LINGVAJ PRITRAKTOJ. (el "Esperanto-Praktiko")

1. Kiu signifas "lui"?

Respondo: "Lui" signifas nur "preni lue", "doni lue" estas "lugi" (Zam.). Ĝenerale oni trovas, por pli facila komprenbleco, "lupreni", "ludoni". Simile: "prunte doni", "prunte preni".

2. "Kiu alportas al nia afero la plej multe da utilo." Ĉu la esprimo "la plej multe da" estas ĝusta?

Respondo: Ni rekomendas... afero plej multan (aŭ: grandan) utilon. Zam. mem. en la unuaj jaroj de Espo, tre ofte uzis "la plej multe", sed poste tute forlasis tiun esprimon, kiu nuntempe estas rigardata kiel malĝusta.

3. Ĉu ne vere, ke "oni" montras ĝeneralan subjekton (iu... ĉiu...); ĝi estas nur subjekto, ne komplemento, sekve ĝi estas ne ŝangebla vorto, ĉar ĝia komplementa natura formo estas "si"?

Respondo: "Oni ofte vundas sin per pulvaj bataliloj, kiam oni ne sufiĉe atentatas." "Oni ofte vundas onin per pulvaj armiloj, kiam oni ne sufiĉe atentatas." Jen la pruvo, ke la formo, "onin" (egalas "iun") estas tre bone uzbla; en la dua frazo ni ne povas uzi "sin", ĉar ĝi havas tute alian sencan ol la unua. "Mi nenian uzas onian (egalas: "ies") naztukon, sed ĉiam nur mian propran." Certe "onian" estas nekutima formo, sed lingve korekta; la frazo estas bone komprenebla.

Dommaras: Kian malfacilan bruan faros hodiaŭ nia loĝanto en la supra etaĝo? Kion signifas do tiu ĉi sencesa sileblegado kaj kraĉado?

Cambristino: Li komencas lerni la anglan lingvon.

Radio Column Lessons to be broadcast from 3LO. Time: 7.45 p.m.

As far as possible the following program will be adhered to:—

Nov. 19th.—Pronunciation—h, ŭ.

Grammar—Participles—active voice.

Correlatives—kio, kiu.

Anecdote:—"Do, ĉu li kisis vin?"

"Jes, ĝuste mi volis diri al li ne fari tion, li simple per la kiso prenis la parolon el mia buŝo."

Dec. 3rd.—Pronunciation—aj, oj, ej, ŭj.

Grammar—Participles—passive voice.

Anecdote:—"Mi aŭdis, ke s-ro Bruno postlasis ĉion, kion li posedis, al orfejo."

"Kiom li postlasis?"

"Ok infanojn."

Atentu Sinjorinoj!

Pri la Gentileco. Iam kelkaj viroj veturis hejmen, post la taglaboro, en funkepeo de vagonaro. La kupeo preskaŭ pleniĝis, kiam eniris laŭmoda, juna fraŭlino, kiu, malgraŭ la malaprobaj rigardoj de la supera sekso, sidigis gaje, krucigis la kruojn, prenis elegantan cigaredujon, kaj komencis fumi. La superuloj koleterte rigardadis ŝin, sed ĉu ŝi hontis? Tute ne! Ĉe la proksima stacio, maljunulo eniris la kupeon, sed ne plu trovigis sidlokon. Neniu el la viroj moviĝis, sed la eleganta, laŭmoda fraŭlino tuj staris, kaj insistis ke li havu ŝian sidlokon.

—M.C.

Veraĵoj pri la Virinoj.

Pri la Vanteco. Antaŭ nelonge, virino eliris el aŭtomobilo ĉe granda oficej-konstruaĵo en la ĉefurbo, por viziti oficejon tie. Ŝi estis iom dika, portis pelt-veston, kaj devis promeni per lambastonoj, havante nur unu kruoron. Ŝi devis superiri ŝtuparon de la strato ĝis la lifto, kiun ŝi malfacile sukcesis fari, per la helpo de kunulino kaj la aŭtomobilisto. Estis tiam, ke oni rimarkis, ke ŝi portis unu el la laŭmodaj, longpintaj kalkanumoj sur la ŝuo de sia kompatinda restanta piedo!

Parolu Esperante ĉiam kaj al ĉiuj ĉe la klubo! Ne gravas se oni ne komprenas vin; tio ĉi nur pruvos, ke vi

estas pli lerta esperantisto ol tiu al kiu vi parolas. Ankaŭ ne gravas se vi ne komprenas lin, kiu parolas al vi—vi povas certigi vin, ke li ne povas paroli sufiĉe bone por esti komprenata. La ĉefa afero estas **Paroli Esperante**—ne, kompreneble, pro tio, ke vi bezonas la ekzercon—tute ne, mi bone scias, ke vi estas flua parolanto—sed, por helpi al la kompatinduloj, kiuj ne estas tiel lertaj kiel vi mem. Ili certe ne ekzerkos la langon pri la lingvo, se vi ne alparolas ilin esperante, kaj postulas respondon tiulingve. Tial estu bonfaranto al viaj samklubanoj, kaj diru kelkajn esperantajn vortojn al iu—nun—tuj!

Ankaŭ, ne forgesu paroli pri Esperanto ekster la klubo, kaj se oni eniĝas aŭ ridas je vi, tiam parolu **Esperante**, libere kaj sendanĝere, por vengi vin!

—M.C.

RECEPTOJ

Bovajo kun bananoj. El Francujo.

2 funtoj da bovaĵtranĉaĵoj, 2 uncoj da butero, 4 bananoj 1 bulbeto, 4 telegrando da lakto, 2 flavaĵoj de ovoj, kreno, petroselo, fritiga graso, pipro kaj salo, faruno, paneroj.

Tranĉu la bovaĵojn en ses egalajn pecojn, gustigu per pipro kaj salo; kradorstu ambaŭflanke en butero sur varmega fajro dum ok minutoj, kaj metu flanken en bakfornon. Fritu la bulbeton en la butero en kiu kuirigis la tranĉaĵoj, sed ne ĝin brunigu; metu en kaserolon kun lakto kaj flavaĵoj de ovoj, miksu ĝis varmega sed ne bolanta. Senŝeligu la bananojn, duonigu ilin longe kaj larĝe, metu ovon kaj panerovon en farunon, kaj fritu en graso. Servu la tranĉaĵojn sur varmega plado, metu la kranon raspan en la saŭcon, kaj verŝu iom sur ĉiun tranĉaĵon; aspergu sur ili la hakitan petroselon, aldonu la frititajn bananojn, kaj servu kun ordinara bruna saŭco.

Flava Pudingo. El Austrio.

Tranĉu ses ovkuketojn, ŝmiru ilin per frambaĵo au abrikotojaĵ, kaj metu ilin kune kiel sandviĉoj. Arangu ilin nete sur vitra plado, elversu sur ilin unu glason da vino (oporta) kaj lasu dek minutojn. Kovru la tuton per makaronoj, kiujn arangu piramidforme, elversu duonpajnton* da kustardo, ornamu per glaceaj ĉerizoj; kirfu duonpajnton da kremo kaj metu ĝin sur la

tuton. Aldonu kiel belaĵo senŝelig-tajn mugaldojn, angelikon kaj ĉerizojn.

—pajnto (Rhodes, kaj Fulcher kaj Long): iom malpli ol $\frac{1}{2}$ de litro.

Bagatelajoj.

Anoj: Mi supozas, ke vi ne plu parolos al Etelo, kiam vi vidas ŝin surstrate?

Manĝo (indigne): Certe ne! Mi eĉ ne rimarkas kiajn vestojn ŝi portas!

Ho, estas malfacile resti fidela al viro.

Kion mi do diru—mi devas resti fidela al tri.

Do via edzo uzas senŝerigan kuraĉmetodon? Ĉu ĝi efikas?

Bonege. Imagu: sur la bruno li havis tuitaĵn militŝipon, kaj nun ĝi estas savboato.

ARBARAJ FAJROJ.

Ĉiu somero enhavas por la Aŭstralia bienetulo teruron de fajroj. Li observas la herbaĵojn bruniĝi sub brula suno kaj kalkulas la tagojn ĝis lia rikoltaĵo pretiĝas tranĉiĝi. La pasanta vagisto maltrankvile interesas lin ĉar senzorge faligita alumeto, aŭ kampafajro lasita neestingita povas kausi katastrofon. Fine la tritiko tranĉiĝas kaj stakiĝas ĉirkaŭ la kampo, kaj la farmisto febre laboras por ĝin formovi al la draŝmaŝino, kiu funkcias en la plej proksima urbo. Tiam li sopiras pli libere, kvankam li ankoraŭ havas multon, kiun li povos perdi. La tero krakas por la somera varmego, semajno post semajno estas senpluva, kaj la varmega nordvento ŝarĝiĝas perodoro de brulanta verdaĵo.

Tiam unuvespere, kiam la suno malleviĝas kiel fajra karmezina pilko, ruĝa brilego avertas lin pri alproksimiĝanta danĝero. Ĉiu brutaro tenata apud la domo kiel antaŭzorgo kontraŭ urĝeco, estas forpelita en la malplenan korton, kaj tiam la kulturisto kaj lia familio tranĉas branĉojn por elbati la fajron. Ĝi atingas ilin kun terura rapideco, unue nubo de sufoka fumo intermiksita kun fajreroj, kaj en momento la seka herbaĵo sub iliaj piedoj kraketas en flamojn. Ili elbatas la fajron per la verdaj branĉoj apenaŭ ekrigardante la petolaĵojn, kiujn ĝi ludas ĉirkaŭ ili. Ĝi superkuras la pendantan ŝelon de granda eŭkaliptarbo kaj eksplodas en flamego, minacante la bieneton per brulantaj branĉoj falantaj desupre. Ĝi atingas la sekan

stoplon kaj rapidas trans ĝin kun goja bruego. Antaŭ tri semajnoj la rikoltaĵo suferus la saman sorton, sed la farmisto kaj lia familio ne havas tempon rimarki ĉi tiujn aferojn. Ili subbatas la flamojn promenant inter ili kun brulettaj vestoj kaj vezikitaj manoj. Ili batalas por sia hejmo kaj la terurigitaj bestoj, kiuj sin kunpremas ĉirkaŭ ĝi en senhela timego.

Kelkaj najbaroj sufiĉe bonŝancaj esti el la zono de la fajro alvenas rajdante galope al ilia helpo. Nur ĝustatempe, ĉar la seka barilaro ekflamiĝas kaj la fajrringo enfermiĝas ĉion. Sitelejn da akvo oni rapide alportas kaj la branĉoj faras sian laboron pli efike post malsekigado. La batalo estas rekomencita pli energie, ĉar la pleja forto de la fajro forpasis. Ĝi muge kuras tra la kamparo mejlon malproksime, lasante malantaŭ ĝi flamantajn arbojn, karbigitajn barilarojn, kaj nigritajn teron. Sed la hejmo saviĝas, kaj ankaŭ la bestoj, kaj la farmistoj kun nigraj vizaĝoj kaj fumruĝigitaj okuloj gratulas unu la alian, ke ĝi ne estas pli malbona.

La proksiman tagon la bienisto povas kalkuli la gradon de sia malbonŝanco. Barilaroj ĉie bruligataj, ne eĉ buŝpleno da nutraĵo lasita sur la bieno por vivigi la brutaron ĝis alvenos la pluvado. Ah, nu, povus esti pli malbone. Li povos pagi por la paŝtado de la bestoj sur ties kampo ĝis la herbaĵo ree kreskos; li estas bonŝanca, ke li savis sian rikoltaĵon, tial li povas trovi la monon. (El la viktoria lerneja gazeto.)

—A.B.C.

El La Kataluna Esperantisto.

La sekvanta prozopeo aperis en la "Kataluna Esperantisto" de Marto-Aprilo, 1932. Estas fragmento de la "Grafo Lukanor" tradukita el la hispana lingvo de Amalia Nunez.

Bona Viro kaj Lia Filo.

—Sinjoro Grafo Lukanor—diris foje Patronio,—bona viro, terkulturisto, havis fraŭlan filon, tre lertan, al kiu la patro, lacigite de la maljunecaj malhelpoj, deziris transdoni la hejman mastrumadon. Sed li tion ne kuraĝis, ĉar la knabo, tre malkonfidema pri siaj propraj iniciatoj, sin lasis tamen regi de la konsilo de la lasta homo, kiun li renkontis, kaj, ĉar la opinio estas tiel malsama ĝis la homoj estas, kredis prave la patro ke, se la knabo regos,

ĉio estos fari kaj malfari en lia bieno. La vinberujaroĵo estos destinita al plugteroj, tiam, kiam iu tiel konsilos, la herbaĵojn oni igos arbaro, kaj leĝomgardeno la olivarbarojn.

Pro la deziro, ke la knabo lernu sin regi per sia propra ideo kaj ne estu ludilo de malpropraj opinioj, ian ajn foiran tagon la bona viro decidis iri en la apudan urbon, kun sia filo, kun la preteksto akiri kelkajn bezonatajn aferojn.

Ili ekmarŝis, kondukante antaŭ si azeneton, sur kiu oni ŝarĝos la aĉetaĵojn. Malmulte da tempo poste, ili preterpasis aron da terlaboristoj venantaj el la urbo. Ili sin reciproke salutis per unu—Sanktan kaj bonan tagon,—kaj tuj kiam ili pasis, diris la bona viro al sia filo:

—Haltu momente kaj aŭskultu tion, kion ili parolas.

La vojirantoj diris, meze de ridoj kaj ŝercoj:

—Jen bona paro da malsaĝuloj; ambaŭ piedirantaj kaj la azeno sen ŝarĝo.

—Kion ci pensas pri tio?—demandis la bona viro.

—Ke ili diras veron—respondis la fraŭlo;—ĉar la azeno ne estas ŝarĝita, ni ne estas pravaj piediri ambaŭ.

—Do rajdu sur ĝi—ordonis la patro.

Ili daŭrigis sian iradon, je sufiĉe longa spaco, ĝis ili preterpasis alian aron da vojaĝantoj. Ili sin salutis reciproke per la—Sanktan kaj bonan tagon,—kaj tuj, kiam ili preterpasis, diris la bona viro al sia filo:

—Haltu momente kaj aŭskultu tion, kion ili parolas.

La pasintoj diris: Neniame oni vidis tian agon; la laca maljunulo piede, kaj la fortikan fraŭlo rajde.

—Kion ci pensas pri tio?—demandis la bona viro.

—Ke ili estas pravaj—respondis la fraŭlo,—ĉar la penoj pli konvenas al la freŝaj fortoj, ol al tiuj de la jaroj lacigitaj.

—Do malsupreniru, ĉar mi rajdos sur la azeno.

Tiel ili faris, kaj tiamaniere ili vojiris antaŭen, ĝis kiam ili trovis novan aron da vilanĝoj. Ili sin salutis per tiu—Sanktan kaj bonan tagon,—kaj tuj, kiam ili preterpasis, la viro diris al sia filo:

—Haltu momente kaj aŭskultu tion, kion ili parolas.

La plugistoj diris:

—Ĉu vi vidis? La malforta fraŭleto piede, kaj la forta viro kutimiginta al ĉiaj mondaj penoj, rajde.

—Kion ci pensas pri tio?—demandis la bona viro.

—Ke ili estas pravaj—respondis la knabo,—ĉar tiu, kiu pli longe estas kutimiginta al ĉiaj penoj kaj laboroj...

—Do metu vin malantaŭ min, sur la postojan.

Tion faris la filo kaj ili daŭrigis tiel, kelkan tempon, ĝis ili trovis novan aron da kamparanoj. Ili sin salutis per—Sanktan kaj bonan tagon,—kaj tuj, kiam la kamparanoj preterpasis, la bona viro diris al sia filo:

—Haltu momente kaj ni aŭdu tion, kion ili diras.

La kamparanoj diris:—Jen bona paro da mallertuloj; ili elkrevigis la azeneton, antaŭ ol fini la vojiron.

—Kion pri tio ci pensas?

—Ke ili ne eraras—respondis la fraŭlo,—ĉar tiel malforta estas la azeno, ke, kun ni ambaŭ sur la lumboj, apenaŭ ĝi povas fari paŝon.

Haltigis tiam la bona viro la rajdbeston, turnis sin malantaŭen kaj, alparolante la filon, li diris:

—Ci diru al mi, kiu estas prava, kaj kies opinio ci obeas. Ĉar el nia hejmo ni eliris la du piede, kaj ne mankis iu, kiu nun mallaŭdis, pro tio ke ni kondukas la azenon sen rajdanto; ci rajdis poste, kaj estis iu, kiu ne konformiĝis al la fakto ke la junulo rajdas, dum la maljunulo piediras; alia trovis malprava la kontraŭan agon, kiam mi okupis la azenselon; kaj, fine, malplaĉis al alia ke ni du nin metis sur la dorson de la besto. Kaj tiujn opiniojn ci prenis, unu post alia, kiel ciajn. Kion ni povos fari, ke ĝi estu ŝatata de ĉiuj? Nu, mia filo, ni faru la bonon laŭ nia konscienco, kaj ni malestinu la babiladon de la mondo. Tial, ĉar mi kredas tion justa, mi rajdos kaj ci kondukos la rajdbeston.

—Do ni iru, hop...

RECENZ(ET)OJ.

Sperto kaj Konduto: Parolado de J. Krishnamurti, tradukita de P. Stojan. Eldonis de Internacia Biokosma Asocio, Solles-Pont (Var) France. Prezo 3 f.f. 22 paĝoj. Intereses nur al teozofoj multe legintaj en sia fak.

La Juna Robinsono: Legolibreto por infanoj. Kompilis H. J. Bulthuis. Eldonis W. Thieme, Zutphen. La mondama aventuro de Robinson Crusoe rerakontita en tre skeleta formo. La kompilito destinas ĉi-verketon precipe por la holanda geteularo; ĝi enhavas tial dulingvan vortprovizon. La ilustrito estas vive desegnitaj, la lingvaĵo senpene legebla. Nur "sabla-

benko" (A. sandbank, G. Sandbank, H. banco de arena, F. banc de sable, I. banco di rena) haltigas, pro tio, ke en ĉiu vortaro troviĝas la nepreciza formo "sablaĵo." Ĉu ne "sabla rifo"? "Almanako" estas pli ol "kalendaro." Pro kialo konata nur al li mem s-ro B. skribas la daton 1830, kiel tiun en kiu Crusoe forkuris de sia mastro; li suriras ŝipon forvelonta al Aŭstralio! En la tagoj de De Foe, aŭtoro de la verko, Aŭstralio estis tero nekonata. Rekomendinda lernilo. Pĝ. 50, prezo 0.60 Sv.f.

De Paĝo al Paĝo, Literaturaj profiloj, verkita de L. Totsche. Eld. de Literatura Mondo, Budapest. Pĝ. 120. Prezo broŝurita 0.50 Sv. f. bindita 0.80. Ludoviko Totsche, juna Hungaro, riĉe dotita per la kritika kapablo, per la supra verko provas doni en libra formo la unuan kolekton de serioze konsideritaj studoj pri la Esperanto-literaturo. Ni rimarkas, ke li sin limigas preskaŭ tute je "impresionismaj" originalaj verkistoj, al certaj ĉefkunlaborantoj de Literatura Mondo. Ĉi tiu fakto estas pripensinda, tial ĉar ni devas konfesi, ke al la nomoj enkadrigitaj de Totsche, estas malfacile aldoni tiun de ankoraŭ konata aŭtoro, kiu per sia originala Esperanto nun influas ĉe senteble la iradon de nia lingvo. Jen mi ekspensas nur al tri. D-ro Valienne, aŭtoro de la unuaj grandaj originalaj romanoj, estas forĝesata de la nuna generacio; s-ro Luyken, malsana, jam de jaroj formetis la plumon; lia verkaro "distingiĝas per pura lingvo, belaj stilaĵoj, altaj ideoj"; s-ro H. Bulthuis, fekundimaga literaturteksisto, kiu, per simpla, hejma lingvaĵo, en ne tre pasintaj tempoj ĉarmis nin per siaj naive homaj rakontoj, nuntempe foruzas la fortojn tradukante klasikaĵojn el fremdaj por li lingvoj.

La asertoj de Totsche estas atentotiraj. Li nomas la verkaron de Baghy kiel "destinita por levi nian poezion al la nivelo de la plej eminentaj naciaj literaturoj." "Prozo Ridetanta" de R. Schwartz li karakterizas kiel "la plej bona originala esp-a novelumolo ĝis nun aperinta"; "Anni kaj Montmartre" (de la sama aŭtoro) estas lia opinio "eble la plej perfekte farita romano, kiun la esp-a literaturo ĝis nun produktis." Ĉu vere?

P. 28, gubern' (malĝuste uzita: legu, administru); 22, trostilizita? (?: 94, la lasta paraĝrafo mistifikas.

Tra Sovaga Kamĉatko, de Sten Bergman, el la sveda trad. Birger Girdman. Pĝ. 276, Prezo broŝ. 5 ŝil., bindita 6/9p. plus afanko. Ekzistas certaj belproduktitaj libroj Esp-aj, pri kiu fieras niaj propagandistoj. Vizitate de ne-esperantaj amikoj, ili senhezite etendas la manon prene al tiuj imponaĵoj, por konvinkigi pri la kreskanta graveco de nia lingvo ĉe la eldonfirmoj. Jen ankoraŭ tia libro. Eldonis ĝi la Eldona Societo Esperanto, Stockholm, kun la sama zorgo, kiu karakterizis ĝian "Per Balono al la Poluso." La nuna verko, tradukita en dek unu lingvojn, jam merite ricevis la plej altan laŭdon de laŭtomata re-

vuoj en diversaj landoj, pro ĝia valora kontribuo al la scienco konata.

Kamĉatko, duoninsulo, kuŝas nordoriente de Azio, malmulte konata de la cetera mondo. Gesroj Bergman bonhumore sed instrue priskribas siajn aventurojn inter ĝiaj strangan sed gastamaj popoloj, eskimosimilaj homoj, kiu senĝene trinkadas blato-riĉan teon kaj tiam kaj tiam lasas la domojn kun fermaj pordoj-fenestroj, por ke la videntaj neĝventegoj traflui ilin, kaj per tio balau for la fi-inksektajn armeojn.

La jena paraĝrafo donas ekzemplon de la interesa enhavo kaj simpla stilo de la verko. "Troviĝis veterinaro en Petropavlovsk, estono, kiu loĝis minimume dek jarojn en Kamĉatko. Lia distrikto estis tiel vasta, ke jam je la komenco li komprenis la senesprecon povi fari ian utilon kaj tuj decidis nur vegeti. Li neniam forlasis Petropavlovsk kaj ne havis laboron dum multaj jaroj, kvankam li estis en ofico kaj akceptis salajron. Li ankaŭ diris, ke li forgesis ĉion, kion li lernis en sia fak." S-ro Girdman, la tradukinto, montras sin lerta faristo de trafaj parolturnoj, revestante en Esp-on la hejmcenan lingvaĵon de la originalo. Cerbripoze estas legi lian verkon post certaj, kies pensneblecoj ni tiel penpene travagis en la lasta tempo.

Kelkaj neologismoj ne en la Plena Vortaro ne ricevas noton en la posta listo de vortklarigoj. Interesaj estas "spuro" (paŝsignoj de bestoj); "tenaca" (A. tough); 19, "eksproprado." Granda nombro de fotografaĵoj prenitaj de la aŭtoro forte kromvalorigas la libron.

(Robo.)

ĈU SIMIOJ EN AŬSTRALIO?

Townsville, Kvinslando:—Terestploristo, s-ro R. King, konfirmas raporton de aliaj homoj, ke simioj troviĝas sur sovaĝa tero en la duoninsulo Cape York. Li diris, ke, dum vojaĝo tra tiu parto, li mortpafis du. La regiono, en kiu li ektrovis la bestojn, situas sudokcidente de la or-tero nomata Batavia, estas larĝa ĉirkaŭ 48 kilometrojn kaj sin etendas laŭlonge de la duoninsulo proksimume 96 kilometrojn. King sciigas, ke vojaĝigri en tiu landparto estas malfacile, ĉar tie vaste kreskas speco de kanherbo ofte alta 15 futojn. La kanaĵoj flankas arbustaĵojn; en ĉi tiu King vidis la simiojn pli ofte en aroj de 15 ĝis 25. Signoj pri aliaj bestoj tute malestis.

Antaŭ kelka tempo, kiam li estis ĉe la indiĝenoj de Daintree, tiuj asertis, ke simioj loĝas en la nordo. Kiam li aŭdis tion, li primokis, sed nun, mem vidinte la bestojn tie, li ja scias, ke ĝi estas vera. Liaopinio la simioj estis

(vidu kol. 3, p. 8)

POR LA KOMENCULOJ.

LA CIKONIOJ (Daŭrigata).

La knaboj daŭrigis la kanton:

"Pendigota la unua,
Rostota june la dua,
Estos pafita la tria,
Kaj kvara en mort' agonias."

"Aŭskultu al tio, kion kantas la knaboj," diris la cikonioj. "Ili diras, ke ni estos pendigotaj kaj rostotaj." "Ne ĝenu vin pri tio," diris la patrino, "ne aŭskultu al ili, kaj tute ne gravas kion ili diras." Sed la knaboj kantadis kaj mokis la cikoniojn, fingromontrante ilin; nur unu el ili, kies nomo estis Petro, diris ke estas malbone ridmoki la kompatindulojn, kaj li mem ne partoprenis. La cikonio patrino, dume, konsolis siajn idojn, dirante, "Ne rimarku ilin; nur rigardu vian patron, kiel indiferece li staras tie, kaj sole per unu kruro."

"Ni tre timas," diris la idoj; kaj ili retiris siajn kapojn en la neston.

La sekvantan tagon, kiam la knaboj ree kunigis por ludi kaj vidis la cikoniojn, ili kantis sian rimajon:

"Pendigota la unua,
Rostota june la dua."

"Ĉu ni devas esti pendigotaj kaj rostotaj?" la junaj cikonioj demandis.

"Ne, certe ne," diris la patrino; "vi lernos la flugarton, kiun mi instruos al vi, kaj tiam ni elflugos en la herbejojn, kaj vizitos la ranojn, dum ili kantas 'krok, krok!' tiam ni formangoŝ ilin, kaj tio estos tre amuza."

(Daŭrigota.)

THE STORKS (Continued).

The boys resumed their singing:

"The first he will be hung,
The second roasted young,
They'll come and shoot the third,
And stab the fourth, I've heard."

"Just listen to what the boys are singing," said the little storks. "They say we shall be hanged and roasted." "You need not mind that," said the mother, "don't listen to them, and it matters not what they say." But the boys went on singing and made game of the storks, pointing at them with their fingers; only one of them, whose name was Peter, said it was wrong to laugh at the poor things, and he himself would not join in. The stork-mother, in the meantime, consoled her young ones, saying, "Do not mind them; just look how unconcerned your father stands there, and on one leg too."

"We are so afraid," said the young ones, and they drew back their heads into the nest.

On the following day when the children met together again to play, and saw the storks, they sang their rhyme:

The first he will be hung,
The second roasted young."

"Must we be hanged and roasted?" the young storks asked.

"No, certainly not!" said the mother; "you shall learn to fly, which I'll teach you, and then we'll fly out into the meadows, and pay the frogs a visit as they sing 'croak, croak!' then we'll eat them up, and that will be fun."

(To be continued.)

—E.G.

Westralian Esperanto Society, Perth, W.A. kunvenas ĉiusemajne. Prezidanto, s-ro H. Byatt, D.B.E.A.; sekretario, s-ro David Miller, 73 Berwick-st., Victoria Park, Perth. Komunikadojn al la sekretario.

Masteront Esperanto Club — Meet every Tuesday at 8 p.m. in the Y.M.C.A., Church-st., Masterton. Hon. President, Mr. G. R. Sykes, M.P.; President Mr. A. Dewar D.B.E.A.; Vice-Presidents, Mrs. McNab and Mr. B. Johns; Secretary, Mr. Howard Franks, 38 Workshop-rd. Visitors always welcome.

Auckland (N.Z.) Esperanto Societo kunvenas ĉiunde je 7.30a horo vespere ĉe Nova Preĝejo Halo (New Church Hall), Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell; Sekretario: s-ro C. Brandon. Komunikadojn al la Prezidanto ĉe 2 Pukenui Road, Epsom.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, sinjoro P. Hudson; sekretariino, f-ino L. Irwin, D.B.E.A. Adreso, Box 731F, Elizabeth-st., P.O., Melbourne. Kunvenoj: Scots' Church Hall, 97 Russell-st. Marde vespere, je la oka horo. R. Banham, "Age" Read-

ing Room, Collins-st., post la 18ja horo.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 8-10 pt. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building" 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto: s-ro A. W. Peacock; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 64 Brighton-st., Croydon.

Brisbane Esperanto-Societo kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str., proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: s-ro F. T. Simon. Viceprezidantoj: s-roj H. Hutton kaj S. Parry. Bibliotekisto: Oskar Behucken (Del. U.E.A.). Sekretario: fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, G.P.O., Brisbane (Queensland).

Wellington Esperanto Club. — Meets every Tuesday 8 p.m. in the Y.M.C.A. Willis St., Wellington. Visitors always welcome. Prezidanto, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A.; Vice-President, Mr. E. C. Jack; Secretary, Miss G. Carty, 33 Tanera-crt., Brooklyn; Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A. Write for book list.

alportitaj el la Malajaj Insuloj en la fruaj tagoj de la sudpacifika komercado kaj sin tenas en la profundo de la densa kreskaĵo, kien homo neniam paŝpenetris.

Komentante la supran, la direktoro de la Melburna Zoologia Ĝardeno diris: "Mi neniam antaŭe aŭdis pri simioj s-ron King malprava kaj sugestis, ke la "simioj" estas koaloj (Phascogaleus cinereus), delfoj aŭ arbgrimpaj kanguruoj. "Nur tre malmultaj arbgripulbestoj troviĝas en Aŭstralio," li aldonis.

POST.

Leongatha and others: Thanks for cutting, and good words.

B. in O. "Magistrato" is not an individual; "fiereco" is sometimes good; "vanteo" never. Through the Germans "fabriko" is pushing out the correct "fabrikejo." "Uzino" (F. usine) is a factory, too!

Ilp. in S. You can see how Zamenhof used "domaĝi" by 2 Sam. 12/4.

The next number is scheduled for 12th Dec.